| Telefono kaj Retpoŝtadreso                                      |                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                   |          |  |
| Reta ligilo por elŝuti ĝin (Marki la <input type="checkbox"/> ) | <input type="checkbox"/> 1150158647@ qq.com<br><input type="checkbox"/> filmkonkurso2014@163.com<br><input type="checkbox"/> ftp.cri.com.cn<br><input type="checkbox"/> adreso de Youtube :                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                       |          |  |
| Titolo de la konkursaĵo                                         |                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                   |          |  |
| Resumo de la konkursaĵo                                         |                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                   |          |  |
| subtitolo                                                       |                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                   |          |  |
| Rajtigo                                                         | <p>Mi garantias, ke la konkursaĵo estas originala, ke mi havas ĉiujn rajtojn sur la konkursaĵo kaj ke ĉiuj informoj donitaj estas veraj.</p> <p>Mi garantias, ke</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>- La kopirajto pri la muziko por publika uzo devas esti certigita.</li> <li>- La personoj en la filmo permesis la uzon por publika prezento.</li> <li>- La filmfaranto garantias, ke li havas ĉiujn necesajn permesojn kaj rajtojn kaj ke neniuj rajtoj de aliaj personoj estas lezitaj.</li> <li>- Post la konkurso la filmoj estos libere prezenteblaj por ĉiuj sub la "Creative-Commons-Licence (CC-BY)".</li> </ul> <p style="text-align: right;">Dato: _____</p> |          |  |

## UEA atentigis ĉe UN pri la lingvaj rajtoj de indiĝenaj popoloj

Julie okazis en Ĝenevo sesio de la Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP). Stefano Keller, estrarano kaj la ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo, aktivis en la 5-taga evento. Ĝiaj temoj estis alireblo al justico, subteno kaj protektado de la rajtoj de indiĝenaj popoloj, prevento de kaj pretiĝo kontraŭ naturkatastrofoj kaj la evolu-agendo post 2015. Aparte signife estis traktataj la Monda Konferenco pri Indiĝenaj Popoloj kaj la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. Laŭ la celoj de la E-movado, Keller atentigis pri la neceso agi kun respekto al la homa digno de ĉiu popolo, tiel ke neniu el la pli potencaj trudu siajn lingvojn kaj kulturojn al la aliaj. La du tekstoj de Keller, video kaj sonregistraĵoj el la evento, estas enretigitaj.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

## Bonaj novaĵoj ĉe Vinilkosmo!

La elŝutejo de Vinilkosmo – eldonejo kaj disvendejo de Esperanto-muziko, prizorgata de Floréal Martorell – finrekonstruiĝis post la fermo pro pirata atako, kaj nun denove plene funkcias: <http://www.vinilkosmo.com/>. En la rekonstruita retejo eblas elŝuti Esperanto-kantojn, muzikojn en mp3. Ankaŭ nove estas, ke la 2-a albumo de Kapriol', nome „Kavaliriko“, aperis kadre de la promeskampanjo de Vinilkosmo. Ĝi prezentas nederlandan kaj frizajn popolajn kantojn per nekutimaj popolaj instrumentoj. La tria novaĵo estas la distribuado de la nova KD-albumo de Manŭel: „Dankas mi la vivon“. Menciindas la aldonitaj dek instrumentaj kantoj kaj filmoj por karaokeo.

(ret-info [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu))

## Usona-Kanada komuna kongreso

De la 11-a ĝis la 14-a de julio 2014 okazis la Usona-Kanada komuna kongreso en Sidnejo, Brita Kolumbio, Kanado. Foje kune kongresi estas tradicio de la landaj asocioj de Esperanto-USA kaj Kanada Esperanto-Asocio (KEA), kiuj ambaŭ fondiĝis dum la 1950-aj jaroj, kvankam la movado en norda Ameriko havas multe pli longan historion. En 2012 oni komencis aranĝi, ke antaŭ la kongreso okazu la Nord-Amerika Esperanto-Kursaro (NASK), en proksima loko, por allogi pli da homoj. Ĉi-jare NASK okazis en apuda urbo Viktorio. La temo de la dulanda kongreso estis: „Esperanto en norda Ameriko: 60 jarojn post la UNESKO-Rezolvio en Montevideo“. Ĉeestis ĉ. 60 partoprenantoj. La programo enhavis i.a. la temojn: Preter internaciismo al tutmondismo, La

ĉinuk-jargono, Strategio kaj evoluo de UEA, Arto de tradukado, ESF sin prezentas, Malmultekosta Esperanto-komunikado, Kial orient-azianoj daŭre montris/as intereson pri Esperanto?, Kurseto pri la saniĉa lingvo (indiĝena lingvo de Brita Kolumbio), kaj okazis multaj aliaj programpunktoj, ekz. pri muziko, teatro, filmo.

([www.espero.com.cn](http://www.espero.com.cn))

## Jarlibro 2014 aperis

Julie aperis la UEA-Jarlibro 2014. En la antaŭparolo la prezidanto M. Fettes rerigardas al la optimismo en 1914, kiam pacmovado estis forta kaj ekestis diversaj internaciaj organizaĵoj. Ĉion rompis la milito, kiu nuligis ankaŭ la 10-an UK en Parizo. Du trionoj de la 272-paĝa Jarlibro konsistas el la adresoj de 1502 delegitoj en 101 landoj. La fakdelegitoj reprezentas preskaŭ 800 fakojn. La 1-a parto informas pri la organoj, instancoj kaj servoj de UEA kaj TEJO, pri landaj kaj fakaj asocioj, akademioj, edukaj kaj kulturaj instancoj, bibliotekoj, radioelsendoj, kaj pri Esperanto en interreto.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

## La 10-a Eŭropa Esperanto-Kongreso

Okazis en la kroatia urbo Rijeka la 10a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU). Kvankam kun nur 146 partoprenantoj el 21 landoj, do la plej malgranda ĝisnuna EEU-kongreso, ĝi estis tre riĉa enhave. La kongreson aŭspiciis la ŝtatprezidento de Kroatio Ivo Josipović, kio grave levis ĝian prestiĝon, kaj la amaskomunikiloj tre interesiĝis pri ĝi. Aŭspiciis la kongreson ankaŭ la urbestro de Rijeka kaj estraro de la regiono Primorsko-Goranska: la urbo disponigis senpage la kongresejon. La urbestro ankaŭ kunvokis gazetan konferencon. Aperis aro da artikoloj en gazetoj, TV- kaj radio-raportoj. Kadre de la kongresa ĉeftemo okazis 5 prelegoj, inter kiuj 3 de neesperantistaj universitataj profesoroj. La asembleo de EEU akceptis la diversajn raportojn kaj elektis novan estraron por la sekva 3-jara periodo: La prezidanto restas Seán Ó Riain, ankaŭ la vicprezidentino Flory Witdoeck kaj la sekretario Zlatko Tišljar. La malferma asemblea kunsido traktis strategion de EEU, kaj akceptis 5 strategiajn celojn. Pli da detaloj legeblas en raporto ĉe:

La Balta Ondo, <http://sezonoj.ru/2014/07/rijeka-3/>

## La Esperanto-centro en Rumonge ricevis 250 novajn librojn

Sekretario de Asocio Nacia por Esperanto en Burundo Hasano Ntahonsigaye informas, ke la biblioteko de la Esperanto-centro en Rumongo ĵus ricevis proksimume 250 novajn librojn de la Rusia eldonejo Impeto, aĉetitajn

danke al klopodoj de la fonduso „Esperanto en Evoluo“. Tio grave riĉigos la bibliotekon kaj ebligas distribuadon de pluraj ekzempleroj inter aliaj grupoj de la lando. Alia bona novaĵo estas, ke la centro ricevis aliron al elektro. La fonduso „Esperanto en Evoluo“ elspezis grandajn sumojn por aĉeti la terenon kaj konstruigi la ejojn, kaj daŭre serĉas subtenon por la disvolvado de la projekto.

(*liberafolio.org*)

## **Premio Deguĉi al Stano Marĉek**

La premio Onisaburo Deguĉi, „la Esperantista pacpremio“, estis starigita per donaco de Oomoto en 1987, kaj estas aljuĝata ĉiujare. Ĝi konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj, kaj estas asignata pro meritoj en la utiligo de Esperanto kiel rimedo por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de d-ro Zamenhof kaj la instruoj de Onisaburo Deguĉi, kaj pro kontribuo al la celo de UEA kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por aliaj popoloj. Per decido de la UEA-Estraro la ĉi-jara premio estis aljuĝita al Stano Marĉek (Slovakio) pro lia longtempa agado kiel instruisto de Esperanto en multaj landoj, kaj pro lia ĵurnalisma agado kiel redaktoro de multaj Esperanto-gazetoj. Aparte elstarigita estis la eksterordinara sukceso de lia lernolibro *Esperanto per rekta metodo* kun 34 nacilingvaj eldonoj. (*Gazetaraj Komunikoj de UEA*)

## **UEA premiis 11 elstarajn agantojn**

Kadre de la 99-a UK en Bonaero estis anonciti la nomoj de 11 ĉi-jaraj ricevantoj de Diplomo pro Elstara Agado kaj de Diplomo pro Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007. Diplomo pro Elstara Agado: Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (Brazilo) pro modela funkciado kiel memsubtena kaj vigla centro; Rubén Diaconu (Argentino) pro kluba agado kaj redaktado de la bulteno de Argentina Esperanto-Ligo; Ellen Eddy (Usono) pro longtempa prizorgado de Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK); Gotoo Hitosi (Japanio) pro la verko Biografia Leksikono de la Japana Esperanto-Movado; Wim Jansen (Nederlando) pro la 12-jara gvidado de la katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo; Christer Kiselman (Svedio) pro scienca kaj interlingvistika agado kaj eldonado; So Gilsu (Korea Respubliko) pro prelegvojaĝoj en Azio kaj ĝenerala agado. Diplomo pro Elstara Arta Agado: Sten Johansson (Svedio) pro verkista kaj eldona agado; Dmitrij Ŝevĉenko (Rusio) pro eldona agado; Bertilo Wennergren (Germanio) pro kontribuo al la

Esperanta rokmuziko; Eugène de Zilah (Francio) pro verkista agado kaj eldonado de la revuo *La Gazeto*.

(*Gazetaraj Komunikoj de UEA*)

## **SES 2014 en la urbo de UK 2016**

Julie okazis la 8a Somera Esperanto-Studado en la urbo Nitra (Slovakio), kiu post 2 jaroj gastigos la Universalan Kongreson de Esperanto. SES ne estas kutima Esperanto-renkontiĝo: ĝia ĉefa celo estas instrui Esperanton sur ĉiuj niveloj. Pro tio ĉeestis ne nur fluaj parolantoj, sed ankaŭ multaj homoj, kiuj apenaŭ sciis ion pri Esperanto. Entute ĉeestis 248 homoj el 28 landoj kaj de ĉiuj aĝoj (ekde 2 ĝis 85 jaroj ĉi-foje).

Artikolo pri SES-8 estas legebla en la novaĵretejo

*La Balta Ondo*, <http://sezonoj.ru/2014/08/ses-4/>

## **99a Universala Kongreso de Esperanto**

En la aŭgusta-septembra kajero de *La Ondo de Esperanto* legeblas pluraj artikoloj pri la „kongresa sezono“ en Esperantio. En ĝi aperas, interalie, detalriĉa artikolo de Jukka Pietiläinen pri la 99a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Bonaero de la 26a de julio ĝis 2a de aŭgusto. Legeblas la artikolo en la novaĵretejo *La Balta Ondo*:

<http://sezonoj.ru/2014/08/bonaero-3/>

## **Esperanto-vikipedio: Nun 200.000 artikoloj**

En aŭgusto la Vikipedio en Esperanto atingis la nombron de 200.000 artikoloj. Esperanto per tio okupas la 33an lokon inter la unuopaj lingvoversioj de la Vikipedio. Por komparo: la slovaka versio havas proksimume 194.000 artikolojn kaj la dana 190.000. La Esperanta Vikipedio estas ofte uzata enciklopedio de la Esperanto-parolantoj, kiuj nuntempe troviĝas en pli ol 120 landoj; speciale por lernantoj kaj studentoj ofertiĝas alloga reto de kontaktoj. Pri tio kaj aliaj sciigoj informis Lu Wunsch-Rolshoven per gazetara novaĵo; i.a. li skribis, ke oni taksas, ke pluraj centmiloj da homoj regule parolas Esperanton, kelkaj milionoj supozeble lernis ĝin. En kelkaj landoj lastatempe okazis rimarkinda kresko, ekzemple en Hungario, kie la ŝtata censo por la du pasintaj jardekoj konstatis kvarobligon de la nombro de Esperanto-parolantoj: en 1990 oni kalkulis 2083, en 2011 – 8397. Por 985 el ili Esperanto estas familia aŭ denaska lingvo. Li informis ankaŭ pri la angla Vikipedio en Esperanto-traduko de la projekto WikiTrans.

(Lu Wunsch-Rolshoven)

Kolektis kaj prilaboris

**Uwe Stecher**

# 80-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

Ĉi-jare la 80-a IKBE okazis de la 13a ĝis la 19a de julio en Harkany [harkAnj], Regiono Baranya (Hungario). 57 personoj blinduloj kaj vidantaj akompanantoj el 12 landoj partoprenis la aranĝon.



La estraro de LIBE

**L**a urbeto Harkany, 230 km sude de Budapeŝto, estas fama pro sia varmbanejo (ekde 1823) kaj belaj ekskurseblecoj tra la regiono de akvo, vino kaj kasteloj. La ĉarma, florplena loko posedas multajn belajn verdajn parkojn, pro negrandeco de la setlejo la atmosfero estas kvietaj.

La kongresanoj loĝis en la tristela „Komfort Hotel Platan“. Ĉiu ĉambro estis tre agrabla, kun bongusta manĝaĵo, trinkaĵo kaj bone ekipitaj ĉambroj. Ankaŭ la konferencaj salonoj, uzitaj por la malfermo, prelegoj, vesperaj aranĝoj kaj la fermo dum la kongreso, estis tre komfortaj.

La kongresa temo estis: „Niaj kongresoj – plaĉa diverseco“.

Post la tradicia malfermo, lundon la 14an de julio, kun paroladoj kaj la solena Esperanta himno, komenciĝis la prelegoj kaj kursoj. Preskaŭ ĉiun

antaŭtagmezon, de la naŭa ĝis la deka horo, ni dividiĝis en du grupoj, komencantoj kaj perfektigantoj. S-ino Natalia Kasymova instruis la perfektigantojn per specialaj gramatikaj tekstoj, neforgeseblaj estas la multaj babiladaj ekzercoj.

La plimulto de prelegoj enhavis komunajn, sociajn kaj ekonomiajn aferojn de la blinduloj el diversaj landoj kaj faktoj el la Esperanta historio. Tre impresa escepto estis du prelegoj el Aŭstrio:

S-ino Veronika Haupt prelegis pri „Hungario kaj Aŭstrio, ne nur najbaroj, ankaŭ parte samlandanoj“. S-ro Walter Wagner parolis pri „Heteropoda maxima – giganta araneo“.

La ekskursoj estis tre interesaj. Dum la tuttaga ekskurso, merkrede la 16an de julio, ni vizitis la urbon Pecs [peĉ] en la proksimeco de Harkany. Dum la duontaga ekskurso ni promenis tra la tuta urbeto. Dufoje – en liberaj posttagmezoj – ni uzis la varmbanejon en la proksimeco de la hotelo, kie ni travivis gajajn horojn.

Vespere ni aŭskultis referaĵon de s-ro Jelínek pri la ĉeĥa muziko, kun belegaj ekzemploj, festis nian internacian artan vesperon, kaj babilis kun aliaj partoprenantoj kaj amikoj el diversaj landoj.

La kongreso estis grandega renkontiĝo de blindaj Esperantistoj, interŝanĝo de la pensoj kaj kulturoj.

**Mag. Henriette Etzenberger**  
Aŭstria Ligo de Blindaj Esperantistoj, [esperanto.at](http://esperanto.at)



La partoprenantoj kantas la himnon.

# Zamenhof-Festo en Vieno

**Lastjare pro la neantaŭvidebla malsaniĝo de la AEF-prezidanto d-ro Hans Michael Maitzen ne okazis Zamenhof-Festo en la Pola Instituto.**

**F**eliĉe ĉi-jare Aŭstria Esperanto-Federacio denove invitas al tiu ĉi tradicia festo en memoro al la naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof. Kiel kutime la Pola Instituto en la Unua Distrikto disponigas lokon kaj la necesajn ekipaĵojn. Pri la programo kaj la precizaj dato kaj horoj ni informos pere de la retejo [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at) kaj la novaĵgrupo ĉe Yahoo „aŭstraj esperantistoj“. Se vi volas kunlabori aŭ havas programproponojn, vi estas kore invitita skribi al ni pere de [aef@esperanto.at](mailto:aef@esperanto.at).

## Aŭstria Nacia Himno en Esperanto

**Kion komunan havas la aŭstria nacia himno, la aŭstria politikisto Franz Jonas, la kantisto Andreas Gabalier kaj Esperanto?**

**E**n 2011 la aŭstria parlamento decidis ŝanĝi la himnon por fari ĝin „seksegaleca“ (geschlechtergerecht): el „Heimat bist du großer Söhne“ (patrio de grandaj filoj) fariĝis „Heimat großer Töchter und Söhne“, (patrio de grandaj filinoj kaj filoj). „Bruderchöre“ (frataj ĥoroj) ŝanĝiĝis al „Jubelchöre“ (jubilaj ĥoroj).

Skandalo disvastiĝis tra la aŭstria amaskomunikilaro, kiam la popularmuzika kantisto Andreas Gabalier prezentis en junio la himnon kun la malnova teksto, do sen seksegalecaj ŝanĝoj: Verdpartiaj virinoj, la ministrino pri virinoj G. Heinisch-Hosek kaj aliaj protestis, dum semajnoj okazis akraj, emociaj disputoj pri tio. En intervjuo la „alp-rokisto“ opiniis, ke li memkompreneble subtenas virinajn rajton, sed la „Gender-Wahnsinn“ devas halti („seksegaleca frenezeco“, t.e. la postulata videbleco de ambaŭ seksoj en la lingvo, respektive neglekti ian ajn seksan koneksion).

Ne longe post tiu ŝtormeto en la arbaro de malaltnivelaj gazetoj Viena Distrikta Muzeo informis Aŭstrian Esperanto-Federacion pri festa ekspozicio

pri la politikisto Franz Jonas (1899 – 1974), konata kaj populara prezidanto de 1965 ĝis 1974: „De laborista infano al federacia prezidanto“. Ĉar Franz Jonas estis konviktita Esperantisto, la Distrikta Muzeo planas por la festaranĝo kantigi la nacian himnon en Esperanto. Do ili petis novan tradukon de la himno, ĉar la havebla Esperanto-versio nur montras la malaktualan – ne seksegalecan – tekston. Kune kun mag. B. Tuidar de la Esperanto-Muzeo d-ro Hans Michael Maitzen faris novan tradukon, kio estis unuflanke facila, ĉar ekzistas ja en Esperanto la prefikso „ge-“, sed aliaflanke postulema pro la rimo kaj la kantebleco de la teksto.

Pri tio Aŭstria Esperanto-Federacio informis la Aŭstrian Pres-Agentejon APA kun la atentigo, ke la 26an de julio aperis antaŭ 127 jaroj la Unua Libro de Esperanto de d-ro Ludoviko Zamenhof. La anonco enhavis ankaŭ la sciigon, ke la aŭtoro saĝece kreis la prefikson „ge-“ por montri ambaŭ seksojn. Kelkaj gazetoj – sed ne tre multe – informis pri tio.

La plej amuza kaj kapskuiga mesaĝo aperis en la senkosta gazeteto „Österreich“ (Aŭstrio) kun bildo de la kantisto Andreas Gabalier, la kantanta ribelista kontraŭ „seksegaleca konsiderado“: „Himno nur en Esperanto ĝusta? Gabalier. Aŭstria Esperanto-Federacio proponis kanti la himnon en tiu artefarita lingvo. Nur tiam ĝi estas seksegaleca.“

„Malbona varbado estas pli bona ol neniuj varbado“, kelkaj Esperantistoj opiniis ridetante.

(Uwe Stecher)

Aktuala teksto de la Himno, traduko de Christine Siedl kun modifoj de d-ro Maitzen kaj mag. Tuidar (2014):

*Land' de l'montoj, katedraloj,  
land' Danuba, de kampvaloj,  
lando de l'marteloj, vi!*

*Hejm' de gefiloj eminentaj,  
de loĝantoj por bel' sentaj,  
multglorata ho Aŭstri', multglorata ho Aŭstri'!*

*Arde ĉirkaubatalata,  
en Eŭropa mez' lokata,  
batas brava koro vi.  
Jam depost pra-ulaj tagoj*

*ŝarĝas vin misiaj agoj,  
multprovata ho Aŭstri', multprovata ho Aŭstri'!*

*Novajn tempojn ni eniru  
plenkuraĝe kaj inspiru  
nin al krea harmoni'!  
Ni fidelon ĥorjurante  
patrolandon gloru kante,  
multamata ho Aŭstri', multamata ho Aŭstri'!*

## AEF-kunveno

La 11an de januaro 2015 okazos la laŭleĝa ĝenerala kunveno de Aŭstria Esperanto-Federacio.

Ĉar la plej bone atingebla loko por la plejmulto de la membraro estas en la aŭstria oriento, ni renkontiĝos en Vieno. La precizan horon kaj lokon ni sciigos pere de persona invitilo al ĉiu membro kaj ankaŭ pere la retejo [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at) kaj la novaĵgrupo ĉe Yahoo „aŭstraj esperantistoj“. Se vi kiel membro de Aŭstria Esperanto-Federacio volas kunlabori en la estraro, aŭ havas aliajn proponojn kaj ideojn, bonvolu kontakti nin retroŝte ([aef@esperanto.at](mailto:aef@esperanto.at)), letere (Postfach 39, 1014 Wien) aŭ telefone (0664 82 76 124, ĉiutage de la 6a ĝis la 8a posttagmeze).



## Specialaj germanaj vortoj

La gazeto „Frankfurter Rundschau“ prezentis kvindek germanajn vortojn, kiuj ne estas tradukeblaj en aliajn lingvojn per unu vorto.

Inter tiuj esprimoj, kiujn la gazeto karakterizis mondvaste unikaj, estas ekzemple: *Kummerspeck* (graso pro ĉagreno): graso de homa korpo pro tro da manĝaĵo kiel konsola ago, ekzemple la ĉokolado kontraŭ malfeliĉa amafero. *Schnapsidee* (brandoideo): stulta ideo origine post troa alkoholkonsumo. *Geborgenheit*: La statuso senti sin ŝirmata, sekura, protektata kun

varmeco, hejmeco. *Fremdschämen*: honti por aliaj homoj (precipe prominentuloj), kiuj agas stulte, ridinde aŭ ĝene, sed ne rimarkas tion. *Dunkelziffer* (senluma cifero): ne temas pri ia malhela cifero, sed pri nekonata nombro, do ĝi troveblas en la mallumo; ekzemple ĉe krimoj, ĉar ne ĉiu fiago konatiĝas. *Fernweh*: la malon, la hejmsopiron, konas multaj lingvoj, sed ne la sopiron al la malproksimeco; la angla konas la esprimon „itchy feet“: jukantaj piedoj.

([www.fr-online.de](http://www.fr-online.de))

## Pigor & Eichhorn

Das Berliner Kabarett- und Chanson-Duo  
Pigor und Eichhorn präsentiert die Esperanto-Grammatik in einer gesungenen Version.

Die beiden Künstler sind im deutschsprachigen Raum bekannt geworden durch ihren Salon-Hip-Hop: eine moderne Variante des kabarettistischen Liedes, das aktuelle Musik mit satirischen Texten zusammenbringt. 1999 erhielten die beiden den deutschen Kleinkunstpreis in der Sparte Chanson.

Nachdem sich Pigor und Eichhorn schon bei ihrem letzten Programm mit Esperanto beschäftigten, präsentiert Deutschlandradio im Internet ihre gesungene Esperanto-Grammatik auf:

<http://wurfsendung.dradio.de>

Aus dem Text:

„Wenn ich die EU wär', dann würde ich sagen, wieso

*lernen wir nicht einfach mal so schnell Esperanto.*

*Alle Substantive enden mit -o, tago, monato, jaro, floro.*

*Alle Adjektive enden mit -a, bela malbela kara.*

*Alle Artikel sind la, la granda domo, la bela tago, la bela floro.*

*Und alle Verben enden mit -as, also im Präsens (ach so), mi lernas.*

*Mi tre bedaŭras, ke mi ne estas la EU-o.*

*Domaĝe por la bela Esperanta lingvo.*

*Mi tre bedaŭras.“*

Quelle:

<http://wurfsendung.dradio.de/wurf/index.php/de/Home/Schedule/date/04.05.2014/PlayTrack/1401/SerieId/134/TrackId/1401>

## Jam la 9a SALO

En la vilaĝo Sieber, kiu apartenas al Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, komence de aŭgusto 2014 okazis jam la 9a ĝemelurba junulara renkontiĝo Somera Arbara Lernejo (SALO), surbaze de la neŭtrala pontolingvo Esperanto.

**L**a renkontiĝon ni organizis en la jam konata domo „Haus Diana“. La ĉefrespondeculo Zsófia Kóródy gvidis la tutan renkontiĝon. Asistis Judita Revesz, kiu jam ĉe antaŭaj ĝejnularaj renkontiĝoj aktive kaj verve helpis.

Antaŭtagmeze la gelernantoj el Góra/PL kaj Herzberg/DE intense, sed per ludoj, rakontoj kaj kantoj lernis Esperanton. Ankaŭ dum la komunaj manĝopaŭzoj ili praktikis Esperanton. Posttagmeze okazis komunaj libertempaj aktivecoj, sporto kaj promenado.

Pri interesaj kaj altnivelaj manlaboradoj zorgis la du grupgvidantoj, Esperanto-klubanoj el Góra: Tereza Sibilak kaj Bożena Zajączkowska. Ekzemple ĉiuj povis lerni, kiel pretigi permane belegajn multkolorajn parperflorojn. Alia nova tekniko estis la preparo de kolĉenoj, ringoj, teleroj, potoj kaj korbo el gazetaj paperstrioj, kiujn oni rulis kaj kolorigis. Nekredeble

belajn „juvelojn“, ornamaĵojn kaj elegantan vazaron oni konstruis el tiu malmultekosta materialo. Tuttaga buseskurso veturigis ĉiujn al la grandurbo Braunschweig kaj la eksperimenta muzeo „Phaeno“ en Wolfsburg.

Ankaŭ okazis gvidado tra Herzberg kaj al la kastela muzeo. Tie atendis la junan ĝemelurban delegacion la vicurbestro Wolfgang Weippert, kiu organizis interesan multlingvan ludon. Ĉiuj aktive partoprenis. Dum la festo en la Parko de la asocio Zukuwe ni komune aranĝis Esperanto-informtablon kun ludoj. Multaj uzis la radon de la fortuno por gajni premiojn, ekz. aerbalonojn kun la surskribo „www.esperanto.de“ kaj esperantligvajn bildkartojn. Dum la tuta semajno regis bona etoso. La ĝejnuloj el ambaŭ ĝemelurboj harmonie kunlaboris kaj bone amikiĝis. Tio estas bona rezulto, kaj la urboj daŭrigos la unikan projekton.

## SEP 2014

**Nova sukcesa oferto en Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo:**

**H**erzberg am Harz ne estus la sola „Esperanto-urbo“ en la mondo, se oni ne ofertus oftajn kaj diversitajn Esperanto-agadojn. La plej multaj estas unikaj modeloj por la Esperanto-movado, sed „produktitaj en Germanio“.

La nova ideo temas pri dusemajna blokforma kaj tuttaga Esperanto-kursaro. Oni kuiris kaj manĝis kune. Tio okazis post komunaj interkonsentoj.

Vizitoj de nemalmultaj Esperanto-objektoj kaj esperantlingvaj promen-vojoj ankaŭ apartenis al la riĉa kulturprogramo. Ni vizitis ankaŭ la kastelan muzeon kun la speciala ekspozicio „Esperanto kaj medalarto“.

Okazis nemalmultaj ekskursoj, ekzemple al la „Wilhelm-Busch-muelejo“ en Ebergötzen. Tie oni trovas tradukojn de la mondfama bildstria rakonto „Maks kaj Moric“ en multaj lingvoj, kompreneble ankaŭ en Esperanto.

En la sama vilaĝo troviĝas plua aparte interesa muzeo, nome la „Eŭropa Panmuzeo“. Tie oni povas spekti bildmurojn, ekz. kun la produktado de pano en multaj civilizacioj dum jarmiloj. Sur kelkaj suveniroj, kiel bildkartoj kaj tolsakoj, oni ankaŭ povas trovi la vorton „pano“ en Esperanto, krom aliaj lingvoj. Tio estas bona reklamo.

La mondfama historia Harz-urbo Quedlinburg same estis „devo“ por la staĝantoj. Prelegoj kun fotoj, komuna kantado ktp. nepre apartenis al la konstanta seninterrompa studprogramo.

Okazis multaj fotosesioj, kiuj dokumentis la „Esperanto-kunvivadon“. Ankaŭ okazis kutima „kradrostadfest“.



Manlaborado dum SALO 9 en Sieber



Diskut- kaj studrondo en la ĝardenpavilono de Interkultura Centro Herzberg

La kunvivado kaj la fakto, ke ni preskaŭ senescepte uzis Esperanton, eĉ kelkaj partoprenantoj (kvazaŭ en la komenco sen antaŭscioj) povis atingi bonan kompren- kaj

parolkapablon. Do, la tre intensa „kunvivada“ instruo donis bonajn rezultojn. Certe imitinda ekzemplo por la venontjaraj someraj staĝoj en Herzberg.

## Spontanea gulaŝfesto

**Okaze de la gulaŝfesto en la Esperanto-Ĝardeno Zsófia Kóródy kuiris laŭ tradicia hungara metodo. Granda kaldrono (ĝi vere devenis el la hungara Pusto) bezonis konstantan fajrigan.**

**L**aŭ specialaj receptoj oni enmetis cepojn, kapsikojn, fortan kapsikpulvoron, bonkvalitan bovovianĉon, ktp. Ĉiujn ingrediencojn ni ne volas tuj publikigi, bona kuirrecepto ja devas resti sekreto, ĉu ne?

La freŝaj lignobranĉetoj donis apartan fumaromon. Okazis kelk-hora vetkuirado pro la ŝanĝiĝanta veterosituacio. Tamen la bonodora kaj bonkvalita kuiraĵo „gulaŝo“ allogis preskaŭ 40 gastojn. Evidente ili flaris ion eksterordinaran, ne ĉiutagan. Tamen la subita forta pluvo haltigis eblan vintostumadon.

Kelkajn esperantistojn ni eĉ ne vidis dum kelkaj jaroj, aliaj venis la unuan fojon al amika Esperantenkontiĝo. Aparte ĝojigis nin la

apero de pluraj Esperanto-lernantoj el la gimnazio kaj meza lernejo.

Bonetosa, ripetinda kunveno, eble

ankoraŭ en oktobro 2014, kaj certe denove dum somero 2015.

Bonvenon!



Grupo de babilantoj kun la kaldrono en la fono

## Alvoko rilate al Germana Esperanto -Instituto

**Dum GEK 2013 en Nurenbergo la estraro de Germana Esperanto-Asocio komisiis Peter Zilvar esti la nova fakestro por ekzamenoj de Germana Esperanto-Instituto.**

**P**ost longjara funkciado Gerald Tucker el Augsburg transdonis la taskon al Peter Zilvar en Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo. Se iu pretas deĵori kiel GEI-komisiito pri lingvaj ekzamenoj, bv. senpere kontakti Peter Zilvar, rete: [zilvar@t-online.de](mailto:zilvar@t-online.de).

## Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas! *Mark Fettes*

Kiam mi laboris en la Centra Oficejo de UEA en la okdekaj jaroj, ni havis inter sep mil kaj ok mil individuajn membrojn. Nun la membronombro ŝvebas ĉe la limo de kvin mil. Samtempe, tamen, Esperanto disfloras inter multaj junuloj tutmonde, kiuj danke al Interreto fariĝis aktivaj lernantoj kaj uzantoj de la lingvo; kaj ankaŭ mankas en niaj vicoj multaj „veteranoj” de la movado. Nia membrovarba kampanjo celas do rekreskigi nian „rondon familian,” kiu praktike kaj simbole konsistigas la kernon de la Esperanto-movado mondscale.

**K**ial do aliĝi al UEA? Ekzistas multaj bonaj argumentoj por tio. Helpu nin disvastigu ilin – dum landaj kongresoj, ĉe lokaj grupoj, en revuoj, en Facebook, Lernu.net, radioprogramoj kaj en Esperanto-televido. Kaptu ĉiun okazon por menci, ke vi mem estas membro de UEA. Per via helpo nia monda asocio povos rekapti la fortojn bezonatajn por fronti la defiojn de la 21a jarcento!



Per aliĝo al UEA, **oni kontribuas al la tutmonda kresko de Esperanto.** Ĉiujare per siaj diversaj fondaĵoj UEA donas konkretan subtenon al asocioj kaj aktivuloj en Azio, en Afriko, en Ameriko; per tiu agado, nia komunumo fariĝas kulture pli kaj pli riĉa, bunta, inkluziva.

Per aliĝo al UEA, **oni plifortigas la voĉon de la lingvo kaj movado.** Estas ĉefe la reprezentantoj de UEA kiuj argumentas por la valoro kaj aktualeco de Esperanto ĉe UN kaj Unesko kaj en diversaj internaciaj forumoj. Tiu agado ankaŭ helpas krei kondiĉojn por sukcesa informado sur lokaj kaj landaj niveloj.

Per aliĝo al UEA, **oni subtenas instruadon de Esperanto kaj trejnadon de aktivuloj.** Interalie, la AMO-seminarioj de UEA donas rimedojn kaj okazojn por vastigi la konojn kaj kapablojn de homoj sur ĉiuj niveloj de la movado.

Per aliĝo de UEA **oni esprimas solidarecon kun la mondvasta Esperanto-komunumo.** Ĉiujare UEA subtenas kulturajn projektojn diverslande, venigas homojn al kongresoj kaj seminarioj, kaj membrigas junulojn el malriĉaj landoj por doni al ili senton de aparteno al la internacia komunumo. Ofte la dankmesaĝoj de tiaj junuloj al la CO estas ege kortuŝaj.

Kaj ni ne forgesu, ke **UEA-membreco ankaŭ donas personajn avantaĝojn.** Inter ili aparte menciindas forta rabato al Universalaj Kongresoj, 10%-a rabato en la Libroservo, kaj abono al la Gvidlibro aŭ Jarlibro kaj la revuo Esperanto, papere kaj rete. Por aktiva esperantisto, tiuj estas nemalhaveblaj rimedoj por partopreni en la movado en tutmonda skalo.

Ne mankas argumentoj. Ni disvastigu ilin! Farante tion, tamen ne forgesu pagi vian propran kotizon—eĉ ankoraŭ por la jaro 2014! Kaj pagante por la jaro 2015, la jaro de la 100<sup>a</sup> Universala Kongreso, memoru samtempe pri la ekzisto de aliaj kategorioj per kiuj oni speciale povas subteni UEA, kiel Societo Zamenhof, Dumviva Membreco aŭ Patronoj de TEJO. Per donacoj al Fondaĵo Canuto vi povas subteni homojn el malriĉaj aŭ nepagipovaj landoj.

Ek al rekorda kresko de nia membraro en 2015!

Aliĝilo al UEA: <http://db.uea.org/alighoj/alighilo.php>

# Kalendaro

## Aranĝoj ĉirkaŭ la nova jaro

27. decembro – 3. (4.) januaro:

**31-a IF – Internacia Festivalo** – nia adiaŭa IF – en urbo Jülich, Germanio, inter nederlanda limo kaj Köln. Moderna kaj novkonstruita domo, kun hotelsimilaj kaj komfortaj ĉambroj. Kadra temo: novaj energioj. Tuttaga ekskurso al proksima Köln, konatiĝu kun la fama katedralo kaj la ne malpli fama Kolonja Akvo 4711. Plilongiga ebleco ĝis la 4-a de januaro 2015. Inf: Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. Tel. +49-5624-8007, portebla +49-171-4964558, Reto: [HDP@internacia-festivalo.de](mailto:HDP@internacia-festivalo.de)

27. decembro – 3. (4.) januaro: **Novjara Renkontiĝo**

(NR) en Bitburg (apud Trier/Treviso), Germanio. Kutime ĉ. 150-200 gastoj – inter ili sesdeko da infanoj kaj junuloj. Apartaj programoj por junuloj sub la nomo „Novjara Internacia Semajno“ (NIS). Konversacia rondo kaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj. Inf.: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wicelstrasse 9, DE-10551 Berlin, Germanio. Rete: [lu.esperanto@gmx.de](mailto:lu.esperanto@gmx.de)

28. decembro – 2 januaro: **SANO-5** en Herzberg am Harz, Germanio. La alternativa jarŝanĝa seminario: Sano – Alternativo – Novjaro. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr.6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

28. decembro – 4. januaro: **6a JES** (Junulara Esperanto-Semajno) en Weißwasser, Germanio. Vidu ankaŭ <https://www.facebook.com/junularaesemajno>

30. decembro – 4. januaro: **Jarfina FESTego kun novjara Silvestra FESTeno** en Baugé, Francio. Festa etoso kun atelieroj de kantado, ĵonglado, ŝminkado. Spektakloj de klaŭnoj, de kontakta magio. Muziko, koncertoj, ĉio kun spertaj animantoj. Inf.: Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono, MCE, Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé en Anjou, Francio. Rete: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

## PSI 2015

3 – 10. aprilo: **Printempa Semajno Internaci** en Winterberg, Germanio. Printempa kunveno kun ekskursoj, prelegoj kaj kursoj por plenkreskuloj kaj infanoj. Inf.: Germana Esperanto-Asocio, rete: [petra.dueckershoff@esperanto.de](mailto:petra.dueckershoff@esperanto.de), tel: +49 (0)151 / 14 43 80 74

Por informoj pri pliaj aranĝoj bonvolu rigardi <http://www.eventoj.hu/2014.htm>

# Krucenigmo

## Solvo el la antaŭa numero ►►

**Konkurso!** La kaŝitan proverbon bv. sendi al la aŭtoro: [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com). Unu el la solvintoj (decidos loto, limdato la 25-a de novembro 2014) ricevos donace la verkon „107 Krucenigmoj en Esperanto“. La premion pro ĝusta solvo el *Esperanto aktuel* 4/2014 gajnas Andreas Emmerich el Brombachtal. Sinceran gratulon!

|        |        |        |         |        |         |        |        |        |        |        |         |         |        |        |        |        |         |        |
|--------|--------|--------|---------|--------|---------|--------|--------|--------|--------|--------|---------|---------|--------|--------|--------|--------|---------|--------|
| SPACOK | COLOAL | INNOVE | ETERARE | NAMARE | CINIKEC | OPEROO | NOTOAN | OMOTRO | NEAREN | IAROGI | NOBELON | EPOSOTE | MONOTV | ENOTRE | NIFEIN | DPARAD | AGARIKA | SERIOS |
|--------|--------|--------|---------|--------|---------|--------|--------|--------|--------|--------|---------|---------|--------|--------|--------|--------|---------|--------|

| UNUA PARTO DE LA KAŜFAZAO | SIMBOLO DE BORO                           | PARTICIPA SUFIKSO                                         | VI KAJ MI                         | SOLO EN OPERO                   | PIONIRO DE SAT           | DUA PARTO DE LA KAŜFAZAO |
|---------------------------|-------------------------------------------|-----------------------------------------------------------|-----------------------------------|---------------------------------|--------------------------|--------------------------|
| ADVERBA FINAJO            | ORDINARE TRIVIALE FORTE EKSCLITU KOLERIGU |                                                           |                                   |                                 |                          |                          |
| PROKSIMIGA PARTIKULO      | DESPOTT                                   | RILATA AL ORIENTA POPOLO                                  |                                   |                                 |                          |                          |
| ANTAŬHISTORIA, PRIMITIVA  |                                           |                                                           | LIKVV EN SKRIBILO POLVV SUR FLORO |                                 |                          |                          |
| ANTIKA KORDINSTRUMENT     |                                           | RILATA AL KURVAZO KEMIA (C <sub>2</sub> H <sub>4</sub> O) |                                   |                                 |                          |                          |
| DISTANCO INTERHALTLOKOJ   |                                           |                                                           |                                   | SKARAB SUB LIGNA ŜELO DIREKTI   |                          |                          |
| FESTĈE RONDA DATREVENO    |                                           |                                                           |                                   |                                 | TUNO LAŬTIA MANIERO      |                          |
| SIMBOLO DE REZISTANCO     | MAL-LIBERIGI KAMP, TERITORI               |                                                           |                                   |                                 |                          |                          |
| EKSperimenta SUFIKSO      |                                           | KARIMARA INSULAR FIKSA IDE                                |                                   |                                 |                          |                          |
| ZAMENHOFAN E-OBJEKTION    |                                           |                                                           |                                   | EGIPTA SUNDIO NEKONSONANT       |                          |                          |
| LIGNECA PLANT             |                                           | LITOVA ĈEFURB SIDEJO DE SENTOJ                            |                                   |                                 |                          |                          |
| FLAVNIGRA PIKANTA INSEKTO |                                           |                                                           |                                   | E-ISTA FEDERACIO SEKVI ORDONOIN |                          |                          |
| GRAVA ORGANIZO DE UN      |                                           |                                                           |                                   |                                 | SIMB. DE AMPERO ORKOLORE |                          |
| LITRO                     | LUDIL SUR ŜNURO SUFIKSO (frakcio)         |                                                           |                                   |                                 |                          |                          |
| DISTRIBUA PREPOZICIO      |                                           | EDUKITA, INSTRUITA ROMANE „500“                           |                                   |                                 |                          |                          |
| LEVIGANTA AKVOMASO        |                                           |                                                           | DE IU                             |                                 |                          |                          |

HELPO: ip, ut, diabol.



Esperantoplatz in Berlin-Neukölln. Die Künstlerin Adler A.F. (rechts) während ihrer Performance mit Fritz Wollenberg (links) als Moderator.



Zuschauer KiTa-Kinder.



Ina Tautorat und Sibylle Bauer betrachten die Ausstellung.